

La Ondo de Esperanto

Internacia sendependa almanako en Esperanto. 2025. №1



Internacia sendependa almanako en Esperanto. 2025. №1 (323)

La Ondo de Esperanto aperas kiel bitgazeto laŭ la normoj “pdf” kaj “ePub”.

Aperas ĉiusezone. Senpaga literatura suplemento jarfine.

Fondita en 1909 de Aleksandr Saĥarov. Refondita en 1991.

Eldonas kaj administras: Halina Gorecka

Redakcio:

Aleksander Korĵenkov (redaktoro)

Paweł Fischer-Kotowski (vicedaktoro)

Peter Baláž

Stanislav Belov

István Ertl

Irina Gonĉarova

Povilas Jegorovas

Wolfgang Kirschstein

Paŭlo Moĵajevo

Poŝta adreso: RU-236039 Kaliningrad, Staropregolskaja nab., 10-13, Ruslando

Retpoŝta adreso: laondodeesperanto@gmail.com

Retejoj: <https://esperanto-ondo.ru>, <https://sezonoj.ru>

Abontarifo por 2025

Abonanto: 15 eŭroj, 17 usonaj dolaroj, 60 zlotoj, 850 rubloj

Amiko: 30 eŭroj, 34 usonaj dolaroj, 120 zlotoj, 1700 rubloj

Patrono: 100 eŭroj, 110 usonaj dolaroj, 400 zlotoj, 5500 rubloj

Anonctarifo

Plena paĝo: 50 eŭroj (5000 ruslandaj rubloj)

Duona paĝo: 30 eŭroj (3000 rubloj)

Kvarona paĝo: 15 eŭroj (1500 rubloj)

Okona paĝo: 10 eŭroj (1000 rubloj)

Triona rabato pro ripeto.

Donacoj: La donacoj estas danke akceptataj ĉe la redakcia adreso (ruslandaj rubloj) aŭ ĉe nia UEA-konto “avko-u” ĉe UEA.

Recenzoj: Bonvolu sendi du ekzemplerojn de la recenzota libro, kasedo, disko k. a. al la redakcia adreso.

Represoj: Oni povas represi tekstojn kaj bildojn nur kun permeso de la redakcio aŭ de la aŭtoro kaj kun indiko de la fonto.

“La Ondo de Esperanto” (Волна эсперанто). 2025, №1 (323).

Ежеквартальный журнал на языке эсперанто.

Учредитель и издатель: Горецкая Г. Р. Редактор: Корженков А. В.

Подписано в печать: 6 апреля 2025 г.

© La Ondo de Esperanto, 2025

Bazaj informoj pri “La Ondo de Esperanto”	2
En ĉi tiu numero	3
Redakcie	5
Halina Gorecka, Aleksander Korĵenkov. Dankon pro la donacoj!	5
Halina Gorecka, Aleksander Korĵenkov. “La Ondo” denove abonebla per PayPal.	5
Eventoj	6
Delfeno kaj Lupo. La unua JES en Belgio	7
Andreas Diemel. Universitateca Luminesk’	9
Lu Wunsch-Rolshoven, Betti Maul. Novjara renkontiĝo en Wiesbaden	10
Bharat K. Ghimire. La 6a Speciala Ekskurso en Nepalo.	11
Ulrich Matthias. Esperanto prosperas en Malagasio.	13
La historio kaj la estonteco renkontiĝis en Montevideo.	15
Jorgos. La 32a kant-staĝo de la Tut-Pirenea Esperanto-Koruso	16
Irina Gonĉarova. Esperanto en infana tendaro de “Lingvo por Sukceso”.	17
Gao Shuyuan, Xie Ruifeng. Kurso de Esperanto en la Pekina Lingva kaj Kultura Universitato	18
Eŭhen Kovtonjuk. Malgraŭ la milito: Esperanto en Ukrainio.	19
Esperantistino premiita de la prezidento de Burundo.	21
Graĵina Opulskienė. Jubileo de Povilas Jegorovas	22
La Estraro de ILEI kaj la familio La Torre. Premio La Torre 2024	24
Stela Besenyei-Merger, laŭreato de la Premio Maertens.	25
UEA: kandidatiĝu por elektoj en 2025.	27
Kvin komitatanoj B elektitaj sen baloto por 2025-28.	27
Povilas Jegorovas. Senpaga publika trafiko kaj aliaj novaĵoj pri BET-59	28
Aleksander Korĵenkov. BET-59: Al la programo kontribuos	29
Lingvotesta sesio por ses niveloj dum BET-59	29
Povilas Jegorovas. Pli ol 200 aliĝintoj al BET-59	30
Aleksander Korĵenkov. Naŭcent aliĝintoj al la kongreso en Brno	30
Usonanoj baldaŭ invados Kanadon	31
FESTO renaskiĝas	33
Fervojistoj kongresos printempe en Slovakio.	33
Irina Gonĉarova. APERo celebros la 30-jariĝon de MASI.	34
Kastelo Greziljono invitas.	34
Interasocia kongreso de Esperanto okazos en Nanto	35
Koncize (8 novaĵoj)	36
Halina Gorecka, Aleksander Korĵenkov. Ni funebras kaj kondolencas	37
Tribuno	38
Mesaĝo de UEA al UN okaze de la Tago de Holokaŭsta Memoro	39
Mesaĝo de UEA okaze de la Internacia Tago de la Gepatra Lingvo 2025	39
Alessio Giordano. Internacia Tago de la Denaska Lingvo 2025.	40

Jado (Wei Yubin). Kion Esperanto donas al infanoj?	41
Urboj de Ruslando	43
Aleksandr Blinov. Ĉeboksari, la ĉefurbo de Ĉuvaŝio	43
Arkivo	46
Aleksander Korĵenkov. Jubileoj kaj memordatoj en aprilo 2025	47
Irina Gonĉarova. MASI – 30-jara	50
Lingvo	51
François Lo Jacomo. Konferenco de la Akademio de Esperanto	52
François Lo Jacomo. Nova trijara postenperiodo por la Akademio	53
Pri la stataj adjektivoj derivitaj de statŝanĝaj verboj kaj pri la signifokategorio de <i>korupt/</i>	55
Prezidantoj de la Lingvaj Institucioj	61
Kulturo	62
Aleksander Korĵenkov. La belega kaj furioza mondo de Andrej Plaronov	63
Andrej Platonov. La ekdubinta Makaro. La tria filo. La bovino (Tradukis el la rusa Vladimir Jurganov, Aleksander Korĵenkov, Ludmila Novikova)	64
Paulo Sérgio Viana. Ema	92
Julian Modest. Vendejo de ridetoj	95
Miguel Fernández. Nuntempa hispana engaĝiĝinta poezio: Alberto García-Teresa ...	97
Poemoj de Alberto García-Teresa	100
Aleksander Korĵenkov. Nur 88 libroj. Sen bitlibroj kaj EAB	104
Tim Owen. 2024 en libroj por EAB	108
Wolfgang Kirschstein. Oskaro 2025	110
Wolfgang Kirschstein. Marina revenas (Recenzo: Sten Johansson. La nepo de Marina)	119
Sten Johansson. Rikolta malkresko (Recenzo: Belettra rikolto 2024)	121
Carlo Minnaja. Ĉarma, altvalora kolekto (Recenzo: Ivan Turgenev. Versaĵoj en prozo)	123
Paŭlo Moĵajevo. Tre petola, amuza kaj pozitiva albumo (Recenzo: Jonny M. Jonny M. – Petolas)	125
Halina Gorecka. Belettra Almanako, 2024, №51	127
Aleksander Korĵenkov. Unesko-Kuriero pri sklaveco	128
Aleksander Korĵenkov. La lasta Unesko-Kuriero en 2024	128
Literatura Foiro. 2025, №333	129
Literatura Foiro. 2025, №334	131
Mozaiko	132
Stanislav Belov. La sepa arto	133
István Ertl. Spritaj splitoj kaj preskeraroj	134
Perantoj de La Ondo de Esperanto	135

Kovropaĝe: En ĉi tiu numero apud la kutima statistika revuo pri la Esperanta libroproduktado, kiun ekde 1991 ĉiujare proponas Aleksander Korĵenkov, estas legebla artikolo de Tim Owen pri la libroj, eldonitaj pasintjare de EAB. (Foto: Tim Owen)

Dankon pro la donacoj!

Por la abonjaro 2024 “La Ondo de Esperanto” ricevis donacojn de 6 patronoj kaj 29 amikoj, danke al kiuj 29 personoj dum la pasinta jaro senpage ĝuis la legadon de “La Ondo”. (En 2020 estis 4 patronoj kaj 18 amikoj, en 2021 – 3 patronoj kaj 27 amikoj, en 2022 – 4 patronoj kaj 25 amikoj, en 2023 – 4 patronoj kaj 32 amikoj).

Patronoj (100 eŭroj): Benoît Philippe (Germanio), Werner Pfennig (Germanio), Syôzi Nobuyuki (Japanio), Geoffrey Greatrex (Kanado), István Ertl (Luksemburgio), Ilona Koutny (Pollando).

Amikoj (30 eŭroj): Paul Desailly (Aŭstralio), Angelos Tsirimokos (Belgio), Malcolm Jones (Britio), Petr Chrdle (Ĉeĥio), Jindra Drahotová (Ĉeĥio), Jiří Machačík (Ĉeĥio), Lydia Lindla (Estonio), Raita Pyhälä (Finnlando), Tuomo Grundström (Finnlando), François Lo Jacomo (Francio), Jean-Luc Tortel (Francio), Margarete Bastian (Germanio), Sophia Brandt (Germanio), Ulrich Brandenburg (Germanio), Reinhard Fössmeier (Germanio), Antonio del Barrio (Hispanio), Miguel Angel Bueno Avila (Hispanio), Pedro Zurita (Hispanio), István Szabolcs (Hungario), Cleno Fantin (Italio), Carlo Minnaja (Italio), Gražina Opulskienė (Litovio), María Mesías (Luksemburgio), Marc van Oostendorp (Nederlando), Bård Hekland (Norvegio), Aleksandr Ĉernyĥ (Ruslando), Tatiana Rudakova (Ruslando), Nicol Margot (Svislando), Bill Maxey (Usono).

Koran dankon al ĉiuj subtenantoj!

Se vi deziras, ke niaj gazeto kaj novaĵretejo daŭre funkcii kaj pliboniĝu, iĝu abonanto, amiko aŭ patrono de “La Ondo de Esperanto”. Pri la pagomanieroj legu ĉi tie: <https://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>.

Halina Gorecka, Aleksander Korĵenkov

“La Ondo” denove abonebla per PayPal

“La Ondo de Esperanto” estas sendependa internacia gazeto, kiu aperas ĉiusezone sur 120-140 paĝoj laŭ la normoj “pdf” kaj “ePub”. Jarfine la abonantoj de “La Ondo” ricevas senpagan literaturan suplementon.

“La Ondo de Esperanto” estas abonebla por 2025. Estas tri abonkategorioj:

1. Abonanto – 15 eŭroj; 2. Amiko – 30 eŭroj; 3. Patrono – 100 eŭroj

La baza abontarifo restas senŝanĝa ekde 2007. Dum kelkaj lastaj jaroj oni povis sendi la abonpagon nur al niaj landaj perantoj kaj al nia UEA-konto. Sed ne en ĉiuj lando estas perantoj, kaj ne ĉiu abonemulo havas konton ĉe UEA.

Bona novaĵo: Oni denove povas aboni la “Ondon” per la internacia pagosistemo **PayPal** ĉe <https://paypal.me/GGORETSKIY>.

Halina Gorecka, Aleksander Korĵenkov

Eventoj



Kiel kutime, je la jarŝanĝa semajno en Eŭropo okazis la tradiciaj festaj renkontiĝoj, en kiuj oni ne nur bonetose festis kun amikoj malnovaj kaj novaj, sed ankaŭ plibonigis sian lingvoscion, aŭskultis prelegojn kaj ĝuis teatraĵojn kaj koncertojn, inter kiuj estis ankaŭ la JESa koncerto de la hamburga artisto Ch0pstick, kiu komence de decembro registris sian unuan Esperanto-bitalbumon “Transe d’Amo kaj Doloro”. (Foto: Ivo Miesen)

La unua JES en Belgio

La Junulara E-Semajno (JES) estas novjara junulara renkontiĝo, kutime organizata de Pola Esperanto-Junularo (PEJ) aŭ Germana Esperanto-Junularo (GEJ). Ĝi okazas ĉiujare dum la lastaj tagoj de decembro kaj unuaj tagoj de januaro, proksimume dum unu semajno, en iu loko en Eŭropo. Laŭ formo, sed ne laŭ sezono, ĝi similas do al Internacia Junulara Kongreso.

Revenante de JES 2023-24, kvar *roveroj* de la Verdaj Skoltoj imagis organizi ĝin en 2024-25 en Belgio. Roveroj estas tiuj plenkreskaj skoltoj, kiuj provas subteni aliajn projektojn kiel plibonigi Esperantujojn. Eble indas repensi kiel organizi la eventon, varbi kunlaborantojn? Kaj por varbi novajn partoprenantojn: kion junaj homoj ĝuas en Esperantujo?

La JES-projekto konstruiĝis iom post iom kaj finfine ĉe la asocio Verdaj Skoltoj formiĝis internacia teamo kun membroj el Belgio, Nederlando, Germanio, Danlando, Francio, Norvegio, ne ĉiuj estis Verdaj Skoltoj. Kvankam estis portempa teamo, ni celis transdoni sperton kaj rezultojn de niaj eksperimentoj al la sekvonta teamo.

Ni provis memkuiro, plifortigi kaj diversigi subteno-fondusojn, instigi novulojn partopreni, instigi novajn Esperanto-artistojn, malfermiĝi al nova publiko pere de diversaj kotizo-ebloj, krei sekuran lokon por ĉiuj... Kaj ni kreis varbkampanjon kunlaborante kun NR, Luminesk' kaj Esperanto-jutubisto Joleŝo.



Foto: Ivo Miesen



BaRok-Projekto en JES-15 (Foto: Robin van der Vliet)

La 15a JES okazis de la 27a de decembro 2024 ĝis la 2a de januaro 2025 en eksabatejo, kiu iĝis mezlernejo kun internulejo en izolita vilaĝo proksime de Lieĝo, Belgio. Ĉeestis 149 partoprenantoj el 29 landoj (se oni kalkulas Katalunion, Okcitanion kaj Skotlandon kiel landojn).

Dumtage okazis pluraj spektakloj, prelegoj, atelieroj (brodado, ornamaĵo, biergustumado, AI-muzikkomponado...), kursoj, ludoj (inkluzive de kukumio de TEJO, kaŝludo, tabloteniso), diskutrondoj, babilrondoj, kunsidoj.

Vespere, krom gufujo, trinkejo kaj karaokeoj kaj diskejoj ĝis la nokto-nokto-fin', okazis nekredeble mojosaj koncertoj:

- BaRok-Projekto el Brazilo (estis granda defio inviti ilin),
- Ch0pstick el Germanio,
- Mezbakita el Belgio, la plej juna kaj nova duopo en Esperantujo!

Estis ankaŭ la klasikaj silvestra balo kaj Internacia Vespere.

Ĉiam eblis eskapi al la saŭno, kvankam necesis eltrovi singardajn teknikojn por transiri la tre glitan, frostan korton.

Ni dankas al la Valona Esperanto-Asocio, GEJ kaj UEA por ilia subteno.

Pluraj homoj faris filmetojn. Vi povas spekti ilin kaj multajn fotojn ĉe:

<https://mallonge.net/jes-24-25-arkivo>

La 182a elsendo de la podkasto "Varsovia Vento" temas pri JES-15. Irek intervjuis la organizan teamon; vidu la duan parton. <https://mallonge.net/vv-jes>

Delfeno kaj Lupo
uzante artikolon de Yves Nevelsteen

Universitatem Luminesk'

La tradicia silvestra renkontiĝo Luminesk' dum la jarŝanĝo 2024/2025 okazis en la urbo Bielefeld. Bielefeld havas la onidiron, ke ĝi ne ekzistas. Tiu mito estis antaŭenigita dum la pasintaj dudek jaroj kaj volonte akceptita de la partoprenantoj.

La tema programo estis forte influita de la Internacia Vintra Universitato (IVU), aranĝita de Amri Wandel. Kadre de ĝi prelegis Ilona Koutny ("Pri kio ni parolas kaj kiel"; "Esperantlingva bildo de la mondo"; "Mondo, vorto-provizo kaj vortaroj"), Joël Fontaine ("Lumo kaj sano"), Christoph Roether ("Speciala relativeca teorio") kaj Amri Wandel mem pri "Astronomio por scivolemuloj. I+II". Guillem Portel prelegis pri la verkisto Ramon Llull; Barbara Brandenburg pri "Dr. Oetker – pli ol bakpulvoro" kaj Ulrich Brandenburg pri "Limoj de konfliktopreventado", Hamza Salam pri "Homaj rajtoj en Pakistanio", Christiane Oetter pri fabeloj, Timm Penno pri CERN.

Krome, Elke Lies ekzercis ridojogon. "La Perdita Generacio" (Tomio&Hendjo) komune kun ĴeLe (Ĵenja kaj Lena) faris muzikan atelieron kaj Silvestran koncerton. Ulrich kaj Barbara Brandenburg dum la vespera programo prezentis la 110an UKon en Brno. Guido Brandenburg faris prezentadon kun muzikaĵoj pri "Vivo de kantpoeto el Bielefeld".

Okazis ekskurso al la nutraĵfarejo Dr. Oetker, karitata asocio Bethel kaj al la historia muzeo. Sebastian Hoffmann gvidis novjaran promenon al la kastelo Sparrenburg, Kristin Tytgat ofertis lingvokurson, kaj Conny Klee organizis komunan kantadon.

Andreas Diemel



Foto: Guillem Portel

Novjara renkontiĝo en Wiesbaden

La 152 gastoj venis el 16 landoj al la 21a Novjara Renkontiĝo (NR) de EsperantoLand en Wiesbaden, de la 27a de decembro 2024 ĝis la 3a de januaro 2025. Plej longe alvojaĝis partoprenantoj el Brazilo, Kanado, Dubajo kaj Israelo; unu partoprenanto venis el Tromsø en Norvegio, norde de la Arkta Cirklo. La aĝspektro iris de dudeko da infanoj kaj adoleskantoj tra la meza generacio ĝis pliaĝuloj.

Dum unu semajno eblis partopreni varian programon kun multaj prelegoj kaj diskutrondoj. Temoj inkludis geopolitikon kaj la ruslandan-ukrainian militon, milit-propagandon, tradician ĉinan medicinon, impresionismon, astronomion kaj la biokemion de amo. Pliaj temoj estis diskutitaj, ekzemple pri kulturmitoj aŭ “Ĉu eblas aĉeti demokration?” Oni povis partopreni ankaŭ interesan sciencan mirkvizon.

En la programo troviĝis du vesperaj koncertoj (Kaŝi kaj Kimo) kaj ankaŭ la kutima novjara koncerto. Okazis pupteatra prezentado, fiziko en la praktiko (Kio okazos se?..), la Silvestra festo kaj internacia vespero. Vigligis la partoprenantojn kurso de Zumba, kaj oni produktis multajn impresajn objektojn dum paperfaldado kaj ankaŭ en la aliaj manlaboraj sesioj (farbado de T-ĉemizoj, kroĉado, trikado, feltumado). Okazis tablotenisaj kurso kaj turniro, ĵonglado, jogo kaj Qi Gong, krome dancursoj por infanoj kaj por plenkreskuloj. Kompreneble eblis partopreni ankaŭ lingvokursojn por komencantoj, progresantoj kaj konversacion.

Estis ludo-konkurso-posttagmezo kaj en alia tago oni preparis ĉokolado-bananojn ĉe fajro en la ĝardeno.

Serio da ekskursoj kondukis la partoprenantojn interalie al Majenco, al la bahaa templo en Hofheim-Langenhain kaj al pluraj naĝejoj. Kelkaj promenoj esploris la urbon aŭ invitis homojn serĉi manĝeblajn sovaĝajn plantojn. La tradicia novjara promeno estis agrabla postfesta senstreĉiĝo.

Dum la tago oni kutime povis elekti inter tri ĝis ses paralelaj programoj. La kompleta programo troveblas ĉe:

<https://mallonge.net/1ht>.

La plej grava por multaj partoprenantoj certe estis la persona renkonto kun malnovaj amikoj kaj novaj konatoj, kun homoj el multaj diversaj landoj.

Lu Wunsch-Rolshoven
Betti Maul



Unu el la manlaboraj sesioj (Foto: Betti Maul)

La 6a Speciala Ekskurso en Nepalo

Sukcese okazis la 6a Speciala Ekskurso, organizita de la Nepala Esperanto-Asocio (NEspA), kiu daŭris de la 26a de februaro ĝis la 8a de marto. Ĝi estis la unua vere fruktodona programo por la Esperanto-movado en Nepalo ekde la komenco de la koronavirusa pandemio. NEspA efektive instruis multajn nepalanojn, utiligante la okazon. Entute, dudeko da esperantistoj partoprenis la tutan programon, kaj simila nombro aliĝis al diversaj partoj de la ekskurso.

La partoprenantoj inkluzivis du personojn el Rumanio, du el Bulgario, du el Ruslando, kaj po unu el Germanio, Svedio, Nov-Zelando, Hispanio kaj Aŭstrio. La aliaj estis nepalanoj. Ĉi-jare la programo celis inviti esperantistojn de ĉiuj aĝogrupoj por ĝui famajn lokojn en Nepalo kaj samtempe antaŭenigi la landan Esperanto-movadon. Dum la ekskurso la partoprenantoj kuraĝigis homojn lerni Esperanton, interŝanĝi ideojn kaj sciojn, kaj konigi sian propran kulturon. Krome, ĉiuj espereble akiris sperton pri interkultura komunikado. La programo estis speciala pro la koncerto de la famaj esperantistaj gekantistoj Ĵenja kaj Tomio el Germanio kaj Svedio.

La programo komenciĝis la 26an de februaro per akcepto de la gastoj. NEspA formale bonvenigis ilin vespere de la 27a en la hotelo “Marsyangdi” en Tamelo. La prezidanto de NEspA, Bharat Kumar Ghimire, kune kun la ĉefo de la renkontiĝo, L. P. Agnihotry, kaj la antaŭaj prezidantinoj, Indu Devi Thapaliya kaj Maya Rai, esprimis bondezirojn al la partoprenantoj. Ankaŭ la kunfondinto de la renkontiĝo, Philip Pierce, ĉiuj ĉeestantaj nepalanoj kaj la 11 eksterlandanoj esprimis siajn bondezirojn.

NEspA ricevis bondezirmesaĝojn el diversaj partoj de la mondo; multaj bondeziroj estis ricevitaj per la Facebook-paĝo de NEspA. La programo estis gvidita de Nabaraj Buddha, kaj Punya Prasad Acharya oficiale bonvenigis la gastojn. Granda nombro da novaj esperantistoj partoprenis la eventon, inkluzive de pluraj infanoj.

La 11-taga programo komenciĝis per du tagoj en la Katmandua Valo. La grupo vizitis la sanktejojn Pashupatinath kaj Baudhanath. La 28an de februaro la grupo veturis al Bhaktapuro, historia urbo fama pro sia etno kaj elstara kulturo.

La 1an de marto, la partoprenantoj vojaĝis al la nacia parko Ĉituxan, sudokcidente de la Katmandua Valo, kie ili restis du noktojn. Ili ĝuis ĵipano vojaĝon, boatadon, kulturan programon kaj aliajn agadojn, inkluzive de elefanta rajdado. Ili ankaŭ povis vidi rinoceron de tre proksime en ĝia natura loĝloko. La grupo tranoktis en hotelo konstruita laŭ tradicia maniero, kio ebligis pli bone konatiĝi kun la loka vivstilo, manĝaĵoj, vestaĵoj kaj aliaj aspektoj de la vivo en nepalaj vilaĝoj en la suda parto de la lando.

La 3an de marto la grupo ekvojaĝis al Lumbini, la naskiĝloko de Budho. Ili vizitis templojn kaj ĝardenojn. La ĉefa celo estis la preciza loko de la naskiĝo de Budho. La 4an de marto la grupo vizitis Palpan, malgrandan montaran vilaĝon, kie ili esploris lokan bazaron kaj vizitis la Reĝinan Palacon apud la rivero Kaligandaki.

La saman tagon, la partoprenantoj venis en la turisman urbon Pokhara, kie ili pasigis tri tagojn. Ili boatis en la bela lago Pheva kaj ĝuis spektaklajn vidpunktojn. La 5an de marto ili supreniris montetan kreston por vidi la famajn montojn Machhapuchhare, Annapurna kaj Dhaulagiri. Tamen la 6an de marto la vetero ne estis favora, kaj oni ne povis vidi Himalajon. Tamen, ili ĝojis, ke ili ne restis en Palpa kaj povis vidi la montojn en la antaŭa tago. La 7an de marto la grupo revenis al Katmanduo.

La 8an de marto okazis adiaŭa vespero kaj vespermanĝo en la hotelo “Mar-sjangdi”. Ĉiuj parolantoj dankis la organizantojn pro la ekskurso. NEspA ricevis sugestojn kaj konsilojn de la gastoj. La prezidanto de la Aŭstria Esperanto-Asocio, Ewald Schick; la prezidantino de la Rumana Esperanto-Asocio, Mariana Pitar; la bulgara esperantistino Raia Androvska; la rusa esperantistino Olga Ševčenko; kaj la esperantisto el Nov-Zelando, Sophie Henderson, faris specialajn sugestojn kaj promesis kunlaboron en estontaj projektoj. La ĉeestantoj ĝuis la koncerton de Tomio kaj Ĵenja. Atestiloj estis disdonitaj al la partoprenintoj.

Ni dankas ĉiujn organizojn, individuojn kaj partoprenantojn, precipe Little World Pre School kaj Koteswor Multfaka Kolegio, kiuj kontribuis al la sukceso de ĉi-jara Speciala Ekskurso. Kvankam la partoprenantoj ne estis multaj, ili venis el naŭ landoj. Homoj miris, vidante nian interkulturan grupon kaj interesiĝis pri Esperanto. Tio pravas, ke renkontiĝoj estas la vera koro de la movado.

La ĉefa sukceso estis, ke multaj nepalanoj, kiuj jam eklernis Esperanton, sentis, ke ĝi funkcias en praktiko. Iuj partoprenantoj, kiuj antaŭe ne parolis Esperanton, komencis uzi ĝin dum la ekskurso. Ĉi-jare nia temo estis “Revivigo, popularigo kaj interkultura kuniĝo”, kaj ĝi efektive sukcesis.

Bharat Kumar Ghimire





Esperanto prosperas en Malagasio

De la 22a ĝis la 27a de februaro okazis Malagasa Esperanto-Seminario en Antananarivo. Ĝin partoprenis 40 plejparte junaj malagasoj, kaj du eŭropanoj: Laima Vilkelė el Litovio kaj mi el Germanio. Ni atingis nian seminariejon tra etaj, parte marĉaj vojoj, kaj venis al fabela pejzaĝo: Nia seminariejo situis en belega parko ĉe la bordo de lago. Tiun ĉi ejon ankoraŭ elektis pastorino Miora Reveloharison, kiu tamen, ricevinte postdoktoriĝan esplorstipendion ĉe la Universitato de Lausanne en Svislando, ne povis mem ĉeesti nian aranĝon. Ĉeestis tamen ŝia filo Jonathan kaj ŝia edzo pastoro Poina, kiu grave helpis per veturigoj kaj gvido de la kuireja servo.

Bonŝance troviĝis por Miora posteulino, kiu brile ĉeforganizis nian seminarion: Ranja Zafinifotsy, kies organizaj kapabloj impresis ankaŭ neesperantistojn. En 2023 en la aĝo de nur 26 jaroj franca fondaĵo nomumis ŝin direktorino de lernejo kun preskaŭ 300 infanoj en malriĉega kvartalo en la sudo de Antananarivo. Ranja ne nur mem instruas Esperanton en sia lernejo kaj en sia granda parencaro, sed ŝi ankaŭ instigis jam kvin el siaj lernantoj instrui la lingvon. La interesiĝo pri la lingvo, precipe inter malagasaj junulinoj, estas sufiĉe granda.

La unua duono de la seminario estis dediĉita al trejnado de instruistoj kaj al kultura interŝanĝo. La plej sperta malagasa esperantisto, Henriel Fidalalao, trejnigis kvin junajn instruistojn. Pluraj malagasaj partoprenantoj unuafoje prelegis en Esperanto, prezentante sian etnon aŭ malagasajn kulturaĵojn. Ekzemple, prelego pri malagasa tradicia geedziĝo instigis nin al diskutoj pri infanaj geedziĝoj kaj egalrajteco inter viroj kaj virinoj. Laima prezentis la litovan kulturon. Kiel profesia edukistino, ŝi instruis

ankaŭ diversajn ludojn. La malagasaj gejunuloj aparte entuziasmiĝis lerni, sub ŝia gvido, la dancadon de polko.

Mi mem prelegis, ekzemple, pri tio, kiel Esperanto povas helpi al paco, socia justeco kaj ekologio. Rilate al ĉi-lastata temo surprizis min, ke ŝajne neniu malagaso aŭdis, ekzemple, pri Greta Thunberg kaj (tikla temo ankaŭ por mi!) pri flughonto.

La dua duono de nia renkontiĝo estis Kristana Seminario. Ni elektis por ĝi la temon “Virinoj en la Biblio kaj en la nuntempa mondo”. Malagasaj partoprenantinoj prezentis gravajn virinojn el la Biblio, kaj mi mem prelegis pri “Virinoj en kristana pentroarto”, interpretante famajn verkojn de italaj renesancaj pentristoj. Ni multe diskutis pri la nuntempa situacio de virinoj en Malagasio. Aparte ŝoka estis por mi, ke ĉiuj anoj de nia seminario konsentis pri la takso, ke en Malagasio 50-70% de la edzinoj estas batataj de siaj edzoj. Viglaj diskutoj okazis ankaŭ pri seksa perforto en Malagasio kaj pri ties kaŭzoj kaj solvoj.

Ĉiutage post la vespermanĝo komenciĝis kantorondo. Aparte ni ĉiuj ŝatis kanti kaj danci laŭ la kanto “Vi levas min” (You raise me up) de Amira Chun, kiun ĉiu povas libere rigardi kiel himnon pri amikeco – aŭ pri Jesuo. Ni kutimis enlitiĝi frue por ĝui venontmatene la pluan kunestadon en mirinde bela pejzaĝo. Antaŭ unu jaron en la Kristana Esperanto-Seminario mi povis bone interparoli nur kun kelkaj partoprenantoj, sed ĉi-foje mi kaj ankaŭ Laima sukcesis interparoli en Esperanto kun ĉiu.

Nia seminariejo disponis pri naĝejo, kiu ebligis al ni senti nin kvazaŭ en paradizo. Iuj malagasaj gejunuloj estis feliĉaj pro tio, ke danke al Esperanto ili povis unuafoje en sia vivo viziti naĝejon. “Mi amuziĝis kvazaŭ frenezulo, – skribis malagasa junulino, – la ludoj, la naĝado... Ĝuste kion mi volas en la vivo: preĝi, glori Dion, lerni profunde Esperanton, dividi, havi novajn geamikojn, manĝi sufiĉe, amuziĝi”.

Efektive la etoso estis eksterordinare amika kaj harmonia. Mi ŝategis kunlabori kun mia anima fratino Ranja, kaj ĝojis, ke danke al subteno de la germana KELI-sekcio kaj de esperantistoj precipe el Germanio kaj Britio, mi povis promesi al ŝi kovri la financon deficiton de la aranĝo (kies sumaj kostoj, kun T-ĉemizoj kaj belegaj seminarioj broŝuroj, estis ĉ. 4.000€). Ja en lando, kie 80% de la loĝantoj devas vivi de malpli ol 2 eŭroj tage, eblis preni nur simblan kotizon de la partoprenantoj.

Post la seminario Laima kaj mi gastis dum du tagoj ĉe la familio de Ranja, kaj ni ĉiuj kune vizitis belegan parkon, en kiu naŭ specioj de lemuroj vivas sufiĉe libere. Reveninte al Eŭropo, mi jam sopiras reveni al Malagasio. Ranja kaj mi jam planas organizi similan seminarion post unu jaro, eble kun la temo “Kristanaj valoroj en la nuna tempo”.

Ĝi estas demonstra versio de la 137-paĝa marta *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn.

Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:

<https://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>

Senpaga publika trafiko kaj aliaj novaĵoj pri BET-59

La preparlaboroj por la 59aj Baltiaj Esperanto-Tagoj, kiuj okazos la 5-13-an de julio 2025 en Kaŭno, iras intense kaj sukcese. Fine de decembro 2024 Litova Esperanto-Asocio (LEA) skribis turnis sin al la urba municipo de Kaŭno kun propono kunlabori ĉe la organizado de BET-59 kaj petis diversspecan helpon.

Sekve, la 15an de januaro en la urba municipo de Kaŭno okazis organiza kun-sido, kiun partoprenis la vicurbestro Mantas Jurgutis, la vicdirektoroj de la urba administracio Gediminas Barčauskas kaj Eglė Andriuškienė kaj la prezidanto de LEA Povilas Jegorovas. Estis diskutitaj organizaj aspektoj de BET-59. Post tio sekvis konsultiĝo kun diversaj fakoj de la urba administracio. La 23an de januaro estis ricevita skriba respondo de la urbestro Visvaldas Matijošaitis, kiu entenis jenajn aferojn:

1. La urbo konsentis provizi senpagan veturadon per urbaj busoj kaj trolebusoj por la partoprenantoj de BET-59 kun la nomŝildoj dum la tuta periodo ekde la 5a ĝis la 13a de julio. Informojn pri tio ricevos ĉiu partoprenanto de BET-59 ĉe la registrado. Tio estas tre grava kontribuo al BET-59 flanke de la urbo.

2. La urba centro de turismo kaj informado eldonos en Esperanto gvidlibreton pri Kaŭno, kiun ricevos ĉiu partoprenanto de BET-59. LEA prizorgos la tradukadon kaj redaktadon de la tekstoj.

3. La miksitaj koruso “Gintaras” de la urba kulturcentro dum la inaŭguro de BET-59 faros reprezentan koncerton.

LEA partoprenas en la konkurso pri urba financa helpo al BET-59 en la urba projekta programo “Iniciatoj por Kaŭno”.

Teksto pri BET-59 aperos en la urba retejo. Eventuale okazos urbestra akcepto. BET-59 estos amasa, interesa kaj grava esperantista renkontiĝo.

Povilas Jegorovas, prezidanto de LEA



BET-59: Al la programo kontribuos

En la novaĵretejo “La Ondo de Esperanto” estas regule (unu aŭ du fojojn ĉiusemajne) prezentataj artistoj, prelegantoj, instruistoj kaj aliaj personoj, kiuj kontribuos al la programo de BET-59 en Kaŭno. Jam aperis dudek naŭ prezentoj. Vidu iliajn nomojn laŭ la alfabeto ordo:

Lucio Avitabile (Italio), Severija Marija Banaitytė (Litovio), Laura Brazzabeni (Italio), Gediminas Degėsys (Litovio), István Ertl (Luksemburgio), Mark Fettes (Kanado), Koruso “Gintaras” (Litovio), Alex Humet (Belgio), ĴomArt kaj Nataša (Svedio), JoMo (Jean-Marc Leclercq) (Francio), Sakari Kauppinen (Finnlando), Kjara (Chiara Raggi) (Italio), Suzana (Zuzanna) Kornicka kaj Mirek Bartkowiak (Pollando), Prof. Ilona Koutny (Pollando), Eŭheno Kovtonjuk (Ukrainio), Arno Lagrange (Francio), Chajm Antonia Hillel Langholf (Germanio), Perla Martinelli (Italio), Ulrich Matthias (Germanio), Mario Migliucci (Italio), Tim Owen (Britio), Nina Pietuchowska (Pollando), Sigita Railaitė-Sičiūnienė (Litovio/Islando), Giorgio Silfer (Valerio Ari) (Eŭropo), Karlo Spinola (Carlos González Spínola) (Hispanio), Valdas Striužas (Litovio), Ite Tytgat (Belgio), Prof. Amri Wandel (Israelo), Manfred Westermayer (Germanio).

La prezentado daŭras. Legu la prezentojn ĉe <https://sezonoj.ru/bet/>.



AIKO

Lingvotesta sesio por ses niveloj dum BET-59

Kadre de BET-59 en Kaŭno la 10an de julio 2025 eblos akiri diplomojn laŭ la ses niveloj de la LingvoTesta Sistema de la Esperanta Civito, inspirita de la Komuna Eŭropa Framo de Referenco kaj administrata de Kultura Centro Esperantista, asocia membro de Association of Language Testers in Europe (ALTE, Cambridge).

Por kandidatiĝi necesas aliĝi tra <https://mallonge.net/1mt> antaŭ la 10a de junio, escepte de la nivelo C2, por kiu la aliĝo devas okazi antaŭ la 10a de majo. Antaŭ ol aliĝi endas legi la tekston de direktivo Mühlemann, funkcia kiel ekzamena regularo: <https://www.esperantio.net/direktivo-m%C3%BChlemann>

Por la lingvotestado ne gravas aparta studtitolo: oni mezuras viajn “verdajn globulojn” kaj vi ricevas diplomon konforme al via nivelo. La niveloj estas: enira (A1), fundamenta (A2), intera (B1), kapableca (B2), bakalaŭra (C1), majstra (C2).

La LTSEC-diplomoj estas pli kaj pli bezonataj por aspirantoj al postenoj en la konsorcio de la Esperanta Civito. Lingvotestistoj estos prof. Giorgio Silfer kaj d-ino Perla Martinelli.

Por pli da informoj: kce@esperantio.net.

Pli ol 200 aliĝintoj al BET-59

Je la 1a de aprilo al BET-59, kiu okazos la 5-13an de julio 2025 en Kaŭno, aliĝis 212 personoj el 26 landoj. La plej multaj aliĝintoj estas el Litovio – 64. Sekvas Pollando kun 30 aliĝintoj. Vidu la tutan laŭlandan aliĝtabelon:

64 Litovio

30 Pollando

16 Koreio

14 Latvio

13 Germanio

10 Francio

8 Ruslando

7 Italio

6 Belgio, Finnlando, Estonio, Ukrainio

3 Hungario, Nederlando, Pakistano, Svedio

2 Britio, Hispanio, Israelo, Svislando

1 Aŭstralio, Burundo, Kanado, Kongo DR, Luksemburgio, Ugando

La aliĝado daŭras.

Aliĝu ĉe <http://forms.gle/LHYptXyHqoTDnWDp9>

Povilas Jegorovas

Naŭcent aliĝintoj al la kongreso en Brno

Je la 1a de aprilo 2025 jam 900 personoj el 61 landoj aliĝis al la 110a Universala Kongreso de Esperanto, kiu okazos de la 26a de julio ĝis la 2a de aŭgusto 2025 en Brno (Ĉeĥio). Dum marto al la kongreso aliĝis 122 personoj.


Ĉi tiu nombro estas je 21 personoj pli granda ol tiu de la 108a UK en Torino, kiu okazis somere 2023; tiam je la 1a de aprilo la aliĝstatistiko montris 879 aliĝintojn el 55 landoj. Probable, ankaŭ al Brno ĉi-somere venos pli ol mil esperantistoj.

Plej multaj jamaj kongresanoj estas el Germanio – 102 personoj. Vidu la liston de la landoj kun pli ol 25 aliĝintoj:

Ĝi estas demonstra versio de la 137-paĝa marta *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn.

Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:

<https://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>



Ĉi-kajere reaperas la longe paŭzinta sekcio pri la urboj de Ruslando, en kiu la konata Esperanto-aktivulo Aleksandr Blinov prezentas la urbon Ĉeboksari (Чебоксары, Шупашкар), la ĉefurbon de Ĉuvaŝio. Vidu ĝin sur la supra mapo inter Niĵni-Novgorodo kaj Kazano, kaj foje venu al ĝi.




La Patrino rigardas al la Ĉeboksara golfo (Foto: https://dzen.ru/a/ZE9RfKZIYUH7_GVv)

Ĉeboksari, la ĉefurbo de Ĉuvaŝio

Ĉeboksari (ruse: Чебоксары) estas urbo situanta sur la dekstra bordo de la rivero Volgo inter Niĵni-Novgorodo kaj Kazano. Ĝi estas la ĉefurbo de Ĉuvaŝa Respubliko kaj havas ankaŭ la ĉuvaŝlingvan nomon Ŝupaŝkar (Шупашкар). La loĝantaro de la urbo estas iom malpli ol 500 mil homoj, kaj ĉirkaŭ 770 mil kun la loĝantoj en la apudaj urb(et)oj, ligitaj al la ĉefurbo.

La unuan mencion pri la urbo oni trovas en la rusaj analogoj datitaj je 1469, kiam la rusaj trupoj sub la gvido de Ivan Run haltis tie survoje en militiro kontraŭ la Kazana ĥanlando. La rusa nomo de la urbo devenas de la rivereto ĉe kiu haltis la rusa trupo, sed estas multe da versioj pri la signifo de la urbonomo, kaj ĝis nun neniu el ili fariĝis prioritata. Same pri la ĉuvaŝlingva nomo de la urbo, kiu evidente estas finn-ugra, sed oni daŭre diskutas pri la signifo. Eventuale la plej fidinda versio estas la vortero -kar, kiu povas signifi: setlejo, citadelo, baraĵo. Tiun loknomon ni vidas en la relative apudaj finn-ugraj urboj: Siktivkar, Kudimkar, Iĵkar (la udmurta formo de Iĵevsk).

En la jaro 1555a Gurij, la ĉefepiskopo Kazana kaj Svijaĵska, komisiite de Johano la Timinda sanktigis la lokon de la estonta kremlo, kaj per tio komenciĝis la konstruado de la ligna kaj poste ŝtona urbo. La plej antikva ŝtona konstruaĵo, kiu konserviĝis ĝis nun, estas la Katedralo de la entempligo de la Dipatrino (Vvedenski



La Katedralo de la entemplito de la Dipatrino (Wikipedia)

sobor). La katedralo estas nun fama ne nur pro tio, ke poste ĝi fariĝis la centra preĝejo de la ortodoksa religio en la regiono, sed ankaŭ pro la originalaj pentraĵoj en la konstruaĵo, en kiu Petro la Unua estas prezentita kiel sendito de malica spirito. Alia interesa loko, kiu troviĝas proksime al la katedralo, estas la monakejo de Nikolao (ne plu ekzistanta) en kiu en la jaro 1601 laŭ la ordono de Boris Godunov estis forsendita kaj monaĥinigita Maria Ŝestova – la avino de la estonta caro de la dinastio Romanov.

En la jaro 1767 la imperiestrino Katerino la Granda, navigante preter Ĉeboksari esprimis sian admiron pri la urba panoramo, skribinte pri Ĉeboksari “en ĉio ĝi estas pli bona ol Niĵni-Novgorodo”. Ankaŭ Radiŝčev kaj Ŝevčenko skribis pri Ĉeboksari. La beleco de la urbo estis notita ankaŭ de aliaj vojaĝantoj. Ekzemple, la akademiانو Johano G. Georgi, kiu vizitis Ĉeboksaron en 1774 skribis: “Dek tri belaj ŝtonaj preĝejoj, kvar monaĥejoj, urbodomo kaj kelkaj respektindaj komercistaj domoj donas al la urbo agrablan aspekton”.

En la komenco de la 20a jarcento Ĉeboksari havis ĉirkaŭ 5 mil loĝantojn kaj estis malgranda urbo en Kazana gubernio. Post la bolŝevista revolucio la aspekto de la urbo draste ŝanĝiĝis danke al ŝanĝo de la statuso de la urbo. La urbo fariĝas la regiona ĉefurbo, komence de la Ĉuvaŝa aŭtonoma regiono, poste de la Ĉuvaŝa aŭtonoma respubliko, kaj ekde 1992 de la Ĉuvaŝa Respubliko.

Se dum la Sovetunia epoko la simbolo de la urbo estis la monumento de Ĉapaĵev, fama armea gvidanto en la epoko de la bolŝevista revolucio, nun tiun rolon plenumas Monumento de la patrino-protektantino, kiu aperis en la jaro 2003 ĉe la bordo de tiel nomata “golfo”. La 57-metra monumento personigas virinon kiu brakumas la tutan urbon kaj estas dediĉita al patrino de la tuta ĉuvaŝa popolo kiu protektas ĉuvaŝojn kaj simbolas la renaskiĝon de la spiritaj valoroj.

Inter la aliaj menciindaj vidindaĵoj estas la Ruĝa placo, ĉe kiu estas la Nacia muzeo, Ĉuvaŝa drama teatro, kelkaj antikvaj preĝejoj, la riverhaveno kaj multaj aliaj malnovaj kaj novaj monumentoj, domoj kaj stratetoj. Unu el la plej allogaj lokoj de la urbo estas sendube la riverkajo de Volgo kun plaĝoj, kafejoj, sportejoj kaj la kelkilometra promenejo.

Unu el la famiĝintaj konstruaĵoj estas la teatro de opero kaj baletto, kiu tre similas arkitekture al la bazo de ribelantoj el la mondfama serio pri kosmaj militoj. Inter la muzeoj de la urbo menciindaj estas muzeo de biero (biero estas grava tradicia trinkaĵo de la ĉuvaŝa popolo), muzeo de traktoroj (la urbo estas fama pro siaj traktorkonstruaj tradicioj) kaj la muzeo de brodaĵoj (tre fama en la Volga regiono).

Dum la lasta tempo en la urba pejzaĝo komencas aperi objektoj rilataj al la loka ĉuvaŝa kulturo. Ekzemple, la parko “Amazonia”, kiu ekhavis multajn elementojn de la mitologieca ĉuvaŝa kulturo, restoracio “Suvari” ornamita je pratjurka stilo, kafejo “Tutla” (Bonguste); kelkaj vendejoj ekhavis ĉuvaŝajn nomojn: “Ilem” (Beleco), “Ĥitre” (Bela), malgrandaj metalaj figuroj el la ĉuvaŝa fabelaro kaj aliaj.

Sur la maldekstra bordo de la rivero Volgo troviĝas la etnokultura parko Suvar kun pli ol cent lignaj figuroj prezentantaj antaŭkristanajn religiajn skulptaĵojn kaj la ĉuvaŝa sanprotekta feriejo “Ĉuvaŝia”.

Kompare kun la najbaraj milionurboj Niĝni-Novgorodo kaj Kazano, Ĉeboksari estas ne tro granda, ne tro brua, sed tre plaĉa, sufiĉe pura kaj bone organizita urbo, kaj multaj turistoj ŝatas ne nur viziti la urbon sed post la konatiĝo kun ĝi translokiĝi ĉi tien, trovante la urbon tre alloga kaj komforta por la vivo.

Aleksandr Blinov



Arkivo



Antaŭ 75 jaroj, la 1an de aprilo 1950, naskiĝis Sten Johansson, aŭtoro de 29 libroj en Esperanto; la 25an de aprilo 75-jariĝos Peter Zilvar, sukcesa movadorganizanto el la Esperanto-urbo; kaj la 28an de aprilo sian 85an naskiĝdatrevenon festos Jacques Le Puil, franca kantisto, muzikisto kaj redaktoro de “La KancerKliniko”.

Ni gratulas kaj bondeziras!

Jubileoj kaj memordatoj en aprilo 2025

1. Antaŭ 75 jaroj naskiĝis **Sten Johansson** (Júhansson, 1950-1966-), sveda urbadministreja oficisto, verkisto kaj esperantisto; redaktoro de la junulara revueto “Kvinpinto” (1969-71), plurfoja premiito en la Belartaj Konkursoj de UEA, kreinto de la literatura retejo OLE (<http://literaturo.esperanto.net/>); aŭtoro de 29 libroj en Esperanto kaj de kvar en la sveda lingvo; tradukinto de 21 libroj el la sveda en Esperanton kaj de novelaro (24 verkoj) el Esperanto en la svedan; laŭreato de la Diplomo de UEA pri Elstara Arta Agado (2014), laŭreato de la premio de la fondaĵo Grabowski (2018), laŭreato de la Laŭro de la Akademio (2022) pro la romano “Sesdek ok”; lia krimromano “Memor’ mortiga” (2003) ricevis la premion La Verko de la Jaro 2004.

- Legu pli en la retejo OLE <http://literaturo.esperanto.net/autor/johansson.html>.

3. Antaŭ 120 jaroj naskiĝis **Georgij Nikolajevič Teterin** (Тетерин, 1905-1921-1972), sovetunia inĝeniero kaj superlerneja instruisto de radiokomunikado kaj aktiva esperantisto; unu el la refondintoj de la Esperanto-movado en Peterburgo meze de la 1950aj jaroj, prezidanto de la Leningrada Esperanto-Klubo, kunaŭtoro (kun Z. Semjonova) de lernolibro de Esperanto (1958).

11. Antaŭ 40 jaroj mortis **Vilho Setälä** (1892-1906-1985), pioniro de la finnlanda fotoarto, kreinto de la finnlingva fotoleksiko, kaj la plej konata finna esperantisto; sekretario (1918-22) kaj prezidanto (1955-65) de Esperanto-Asocio de Finnlando, ĝenerala sekretario de la 14a UK (Helsinki, 1922), fondinto kaj redaktoro de “Esperanta Finnlando” (1918-73, kun paŭzoj); komitatano de UEA (1920-63), membro de la Akademio de Esperanto (1930-85); aŭtoro de pluraj vortaroj, lernolibroj kaj libroj en/pri Esperanto inkluzive de la finna-Esperanta vortaro (1923) kun pli ol 30 mil kapvortoj kaj lernolibro “Privilegia vojo al lingvoscio: Esperanto” kun kvar internaciaj, tri finnaj kaj du svedaj eldonoj; honora membro de UEA (1933), honora prezidanto de EAF (1979).

- Legu pli en la enciklopedio “Nia Diligenta Kolegaro” (p. 255-257).

12. Antaŭ 90 jaroj naskiĝis **Erich-Dieter Krause** (1935-1947-2023), germana lingvisto, leksikografo kaj esperantisto; aŭtoro de Esperantaj vortaroj, laste de la 1679-paĝa “Großes Wörterbuch Deutsch-Esperanto” (2007), 1512-paĝa “Vollständiges Wörterbuch Esperanto-Deutsch in zwei Bänden” (2018) kaj 2511-paĝa “Vollständiges Wörterbuch Deutsch-Esperanto in drei Bänden” (2023); membro de la Akademio de Esperanto (1986-2023).

14. Antaŭ 135 jaroj naskiĝis **Stanisław Karolczyk** (1890-1907-1965), pola oficisto kaj esperantisto, konata en Esperanto kiel Eska, refondinto, eldonanto kaj

redaktoro de “Pola Esperantisto” (1922-26), kelkatempa prezidanto de Pola Esperantista Societo; tradukinto de pluraj polaj beletraĵoj kaj unu el la du aŭtoroj (kun S. Braun) de la poemaro “Unuaj agordoj” (1912); membro de la Akademio de Esperanto (1948-53).

14. Antaŭ 108 jaroj mortis **Lazarj Markoviĉ “Ludoviko” Zamenhof** (Замenhoф, 1859-1887-1917), ruslanda juda okulkuracisto, aŭtoro de la unua lernolibro de Esperanto (1887) kaj de aliaj lerniloj, tradukinto de pluraj beletraĵoj kaj de la Malnova Testamento, redaktoro de la unua Esperanto-gazeto “(La) Esperantisto” (1889-95), fondinto de la religia-etika doktrino homaranismo.

- Legu pli en la enciklopedio “Nia Diligenta Kolegaro” (p. 304-306). Pri la lastaj jaroj de Zamenhof legu en la artikolo “Ho, mia kor’, ne batu maltrankvile...” de Aleksander Korĵenkov <https://sezonoj.ru/2021/04/zamenhof-26>.

19. Antaŭ 160 jaroj naskiĝis **Aleksandr Andrejeviĉ Saĥarov** (Сахаров, 1865-1904-1942/43), impostoficisto, instruisto kaj esperantisto; la unua profesia esperantisto en Ruslando, fondinto de la librejo (vendejo kaj eldonejo) Esperanto (1907) kaj de la gazeto “La Ondo de Esperanto”, kiun li eldonis kaj (kun)redaktis (1909-17); kompilinto de ses didaktikaj libr(et)oj (lernolibro, du vortaroj, ŝlosilo, frazlibro kaj krestomatio), kiuj en 1916 aperis kiel 448-paĝa volumo “Весь язык Эсперанто” (La tuta lingvo Esperanto), aŭtoro de la satira novelo “Superforta ambicio” (1913) kaj de “Rememoroj de centprocenta esperantisto” (posteume, 1993).

- Legu pli en la enciklopedio “Nia Diligenta Kolegaro” (p. 246-247).

19. Antaŭ 100 jaroj la unua **Internacia Kongreso de Radio-Amatoroj** (Parizo, 1925) akceptis Esperanton kiel sian internacian helplingvon apud la uzataj naciaj lingvoj kaj rekomendis al la radio-amatoroj studi kaj uzi Esperanton.

20. Antaŭ 15 jaroj mortis **Duilio Magnani** (1928-1969-2010), itala romkatolika pastro kaj esperantisto; prezidanto de Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista (IKUE, 1979-95), fondinto de Centro Esperantista Rimina – Ekumena kaj Solidara (2004) por agado en malriĉaj landoj, iniciatinto de mozaikoj kun Esperanto-skribaĵoj en la preĝejo de S-taj Johano kaj Paŭlo en Rimini, kiun oni neoficiale nomas Katedralo de esperantistoj; aŭtoro de la ilustrita libro “Paroĥa preĝejo de sanktaj Johano kaj Paŭlo en Rimini” (2001); honora prezidanto de IKUE (1995), honora membro de UEA (2005), laŭreato de la premio Deguĉi (2007).

- Legu pli en la enciklopedio “Nia Diligenta Kolegaro” (p. 187-188).

23. Antaŭ 145 jaroj naskiĝis **Aleksandr Aleksejeviĉ Postnikov** (Постников, 1880-1907-1925), rusa oficiro kaj esperantisto; propagandisto de Esperanto, kunfondinto (1908) kaj prezidanto (1909-11) de Ruslanda Esperantista Ligo fermita

post lia aresto, refondinto kaj eldonanto de “Ruslanda Esperantisto” (1909-10), ĉef-organizinto de la unua Ruslanda Esperanto-Kongreso (Peterburgo, 1910), fondinto de Universala Ligo (1910).

- Legu pli en la enciklopedio “Nia Diligenta Kolegaro” (p. 233-234).

25. Antaŭ 20 jaroj mortis **Itô Kanzi** (1918-1959-2005), japana eldonisto kaj esperantisto, aŭtoro de okvoluma japanlingva romano pri Zamenhof (1967-83); kolektinta kaj editorinta kun la pseŭdonimo Ludovikito verkojn kaj tradukojn de Zamenhof, aliajn tiutempajn dokumentojn, presaĵojn kaj leterojn kadre de la 58-voluma serio; honora membro de UEA (1990), laŭreato de la Esperanto-Kulturpremio de la urbo Aalen kaj FAME-Fondaĵo (1991).

- Legu pli en la enciklopedio “Nia Diligenta Kolegaro” (p. 139-140).

25. Antaŭ 75 jaroj naskiĝis **Peter Zilvar** (1950-1972-), germana administranto, asekuristo kaj esperantisto; gvidanto de GEA-Filio por Klerigado kaj Kulturo = Esperanto-Centro Herzberg / Interkultura Centro Herzberg (ICH) ekde ĝia fondo en 2004; ekde la proklamo de Herzberg am Harz kiel “la Esperanto-urbo” kunordiganto de la varia por kaj per-Esperanta agado en la urbo; aŭtoro de centoj da priesperantaj artikoloj kaj de du libroj en Esperanto; honora membro de GEA (2008), la Esperantisto de la Jaro 2007.

- Legu pli en la enciklopedio “Nia Diligenta Kolegaro” (p. 307-308).

27. Antaŭ 40 jaroj mortis **Lajos Kőkény** (1897-1919-1985), hungara instruisto, stenografo kaj esperantisto, prezidanto de Hungarlanda Esperanto-Societo (1941-47); redaktoro de “Hungara Heroldo” (1928-30, 1935-36), “Hungara Vivo” (1961-68) kaj “Hungara Esperantisto” (1971-73), redaktoro de la duvoluma “Enciklopedio de Esperanto” (1934-35); aŭtoro de kelkaj libroj en/pri Esperanto; honora prezidanto de Hungara Esperanto-Asocio (1978), honora membro de UEA (1980).

- Legu pli en la enciklopedio “Nia Diligenta Kolegaro” (p. 157-159).

28. Antaŭ 85 jaroj naskiĝis **Jacques Le Puil** (1940-1958-), franca diversprofesiulo, kantisto kaj esperantisto, konata en Esperanto kiel Ĵak Le Puil kaj Ĵak Lepŭil; ofta koncertanto en Esperantaj renkontiĝoj, kantisto kaj muzikisto en ses muzikaj albumoj (“Danĝera ul’”, 1977; “Revenas mi”, 1984; “De Pont-Aven al Varsovi’”, 1985; “Ne donu tro”, 1994; “Mi estas”, 2004; “Sen elizi’”, 2014); kunfondinto (1976) kaj ĝisnuna redaktoro de “La KancerKliniko;” ĉefredaktoro de “Grand dictionnaire français-espéranto” (kun J.-P. Danvy k. a., 1992), tradukinto de pluraj libroj; laŭreato de la premio de OSIEK (2007) kaj de la Diplomo de UEA pri Elstara Arta Agado (2015).

- Legu pli en la enciklopedio “Nia Diligenta Kolegaro” (p. 175-177).



Dum 2022-2024 aperis 12 el la 16 partoj de nia projekto “Rusa Novelaro 2”, kiu ĉi-jare kompletiĝos per aperigo de verkoj de kvar pliaj rusaj verkistoj. La unua el ili, kaj la dek-tria en la serio, estas Andrej Platonov (1899-1951), kies tri rakontojn vi povas legi en la sekvaj paĝoj.

En la belega kaj furioza mondo de Andrej Platonov

Andréj Platónovič Kliméntov (Андрей Платонович Климентов), kiu en 1920 ekuzis la familinomon Platonov formitan el lia patronomo (malnova kamparana kutimo), naskiĝis la 16an (Gregorie: la 28an) de aŭgusto 1899 en apudurbo de Voroneĵ. Lia patro Platon Klimentov estis fervojisto, kaj la patrino Marija Lobočiĥina estis filino de horloĝisto, patrino de dek infanoj, el kiuj kelkaj mortis bebaĝe.

Post sepjara studado en paroĥa kaj urba lernejoj, la 14-jara Andreo komencis labori kiel kontoristo, helpanto de lokomobila maŝinisto, gisisto en tubuzino k. s. kaj ekstudis en elektroteĥnika fako de meza fervojista faklernejo (ruse: техникум) en Voroneĵ. La studojn interrompis la interna milito, dum kiu li servis en la ruĝa flanko, kaj post la milito finstudis en la faklernejo kaj poste laboris en la sferoj de grundoplibonigo, elektrizado. Li estas aŭtoro de kelkaj inventoj kaj de la libro “Elektrizado”, sed la famon kaj ĉagrenon al li alportis verkoj beletraj.

Andreo ekverkis poemojn kiel 12-jarulo, kaj en 1918 komencis kunlabori en Voroneĵaj gazetoj. Liaj fruaj verkoj, precipe scienc-fikciaj noveloj, ŝajnis proksimaj al t. n. “proletaj verkistoj” kredantaj je komunisma estonteco, scienco kaj teĥniko kaj kritikantaj ĉion burĝan kaj klasikan pli, ol tion postulis la “partia linio”, tamen li baldaŭ trovis sian vojon en literaturo kaj sian unikan stilon.

Meze de la 1920aj jaroj liaj verkoj regule aperis en gazetoj kaj libroj, precipe populariĝis lia romaneto “La kluzoj de Jepifanĵ” pri angla inventisto en la epoko de Petro la Granda. Tiutempe li ekverkis siajn romanojn “Ĉevengur” (1926-28) kaj “Konstrufosaĵo” (1930) – avangardaj stile kaj fantastaj forme, ili aperis en lia patrolando nur fine de la 1980aj jaroj dum la t. n. perestrojko. Samtempe (en 1987) post preskaŭ sesdek-jara forgeso estis represita lia fabelforma satiro “La ekdubinta Makaro” (1929), kiun kritikis Stalino mem, doninte la signalon al ĉiaspeca kampanjo kontraŭ la anarkiisto kaj kulako Platonov.

Du jarojn poste aperis lia longa satira novelo “Por rezervo” kun la subtitolo “Malriĉula kroniko” (1931), kaj Stalino duafoje atentis Platonovon pro “la rakonto de agento de niaj malamikoj, verkita kun la celo senmaskigi la kolĥozan movadon”. Stalino petis puni kaj aŭtoron kaj la senkapulojn, kiuj publikigis la novelon, kaj adresis sin al Gorĵikij por ke tiu reeduku la talentan fiulon Platonov. Tamen Platonov restis libera, kvankam preskaŭ ne presata kaj daŭre kritikata, ekzemple en jena maniero:

“Platonov estis preskaŭ nekonata al sia popolo. Lia populareco estas limigita en la malvasta rondo de literaturistoj, adorantaj lian talenton. Platonov ne estas popola ĝuste pro tio, ke en liaj verkoj ne respeguliĝas la veraj esperoj kaj grandiozaj kreaĵ fortoj de la rusa popolo. Platonov estas kontraŭpopola, ĉar en liaj verkoj estas kripligitaj la veraj kvalitoj de la rusa popolo”. (A. Gurviĉ, 1937).

Traduki verkojn de Platonov estas defio, ja li en siaj verkoj, priksribante la belegan kaj furiozan mondon, uzas malĝustan sintakson, troajn vortojn, politikan leksikon en ĉiutagaj aferoj ktp. Sed nia eta teamo akceptis la defion. Ĉu ni sukcesis? Juĝu la legantoj.

Aleksander Korĵenkov

Andrej Platonov

LA EKDUBINTA MAKARO

Inter la ceteraj laborulaj amasoj vivis du ŝtatanoj: normala kampara viro Makaro Ganuŝkin kaj pli elstara kamarado Leono Ĉumovoj, kiu estis la plej saĝa en la vilaĝo kaj, danke al sia saĝo, gvidis la popolan movadon antaŭen, laŭ la rekta linio al la komuna bono. Kaj do la tuta loĝantaro de l' vilaĝo jene parolis pri Leono Ĉumovoj, kiam li ie estis preteriranta:

– Jen, nia gvidanto ien ekpaŝis: morgaŭ ni atendu aplikon de iuj rimedoj... Saĝa kapo, sed la manoj estas malplenaj. Li vivas per sia nuda saĝo...

Makaro, same kiel ĉiu viro, pli ŝatis metiadon ol plugadon, kaj zorgis ne pri la pano, sed pri la distraĵoj, ĉar, laŭ la konkludoj de kamarado Ĉumovoj, li havis malplenan kapon.

Foje, sen permeso de kamarado Ĉumovoj, Makaro organizis distraĵon – popolan karuselon, pelatan al turniĝado per la potenco de l' vento. La popolo amasiĝis, kiel densa nubego, ĉirkaŭ la Makara karuselo kaj atendis ŝtormon, kiu povu rotaciigi la karuselon. Sed la ŝtormo ne rapidis komenciĝi, la popolo staris senafere, kaj intertempe la ĉevalido de Ĉumovoj fuĝis al herbejoj kaj erarvadis tie en malsekaj lokoj. Se la popolo estus ripozanta, ĝi tuj kaptus la ĉevalidon de Ĉumovoj kaj malebligis la perdon por Ĉumovoj, sed Makaro forlogis la popolon de l' ripozo kaj per tio helpis al Ĉumovoj ricevi damaĝon.

Ĉumovoj mem ne postkuris la ĉevalidon, sed venis al Makaro, silente sopiranta ŝtormon, kaj diris:

– Vi ĉi tie forlogas la popolon, kaj mi havas neniun por postkuri la ĉevalidon...

Makaro vekiĝis el sia pensado, ĉar li konjektis. Li ne povis pensi, havante la malplenan kapon super la saĝaj brakoj, tamen li povis rapide konjekti.

– Ne ĉagreniĝu, – li diris al kamarado Ĉumovoj, – mi faros por vi memveturilon.

– Kiel? – demandis Ĉumovoj, ĉar li ne sciis, kiel li povintus fari memveturilon per siaj malplenaj manoj.

– El rulringoj kaj ŝnuroj, – Makaro respondis, ne pensante, sed sentante la tirforton kaj turniĝadon en tiuj estontaj ŝnuroj kaj rulringoj.

– Faru do plej rapide, – Ĉumovoj diris, – aŭ mi kondukos vin al la laŭleĝa respondeco pro la neleĝa distrado.

Sed Makaro pensis ne pri la monpuno – li ne kapablis pensi – sed li estis rememoranta, kie li vidis feron, kaj li ne rememoris, ĉar la tuta vilaĝo estis farita el tersurfaca materialo: argilo, pajlo, ligno kaj kanabaj ŝnuroj.

Ŝtormo ne okazis, la karuselo ne moviĝis, kaj Makaro revenis hejmen.

Hejme Makaro pro angoro trinkis akvon kaj sentis la adstringan guston de la akvo.

“Verŝajne, fero mankas pro tio, ke ni ĝin fortrinkas kun akvo”, – li konjektis.

Nokte Makaro grimpis en la sekan, neuzatan puton kaj vivis en ĝi dum unu diurno, serĉante feron sub la humida sablo. En la dua diurno Makaron eltiris vilaĝanoj sub la gvido de Ĉumovoj, kiu timis, ke la civitano pereos ekster la fronto de la socialisma konstruado. Makaro estis preskaŭ nelevebla – en liaj manoj estis brunaj ŝtonoj da fera erco. La viroj eltiris lin kaj malbenis lin pro la pezo, kaj kamarado Ĉumovoj promesis aldone monpuni Makaron pro la socia tumultado.

Tamen Makaro ne atentis lin kaj post unu semajno faris feron el la erco en la forno, post kiam lia edzino bakis panon en ĝi. Neniu scias, kiel li fandis la ercon en la forno, ĉar Makaro laboris per siaj lertaj brakoj kaj per sia silenta kapo. Post unu tago Makaro faris feran radon, kaj poste ankoraŭ unu radon, sed neniu rado mem moviĝis: ilin necesis ruli per la manoj.

Ĉumovoj venis al Makaro kaj demandis:

– Ĉu vi faris memveturilon por anstataŭigi la ĉevalidon.

– Ne, – Makaro diris, – mi ja konjektis, ke ili mem devus ruliĝi, sed ili ne ruliĝis.

– Kial vi trompis min, vi, spontanea kapo! – Ĉumovoj ofice ekkriis. – Do, faru ĉevalidon!

– Viando mankas, se ĝi estus, mi farus, – rezignis Makaro.

– Sed kiel vi faris feron el argilo? – rememoris Ĉumovoj.

– Mi ne scias, – Makaro respondis, – ja mi ne havas memorkapablon.

Ĉumovoj ofendiĝis.

– Ja vi, diabla solulo, kaŝas inventon de l' tutlanda popolekonomia graveco! Vi estas ne homo, vi estas individuisto. Mi tuj plurfoje monpunos vin, por ke vi sciu, kiel necesas pensi!

Makaro obeis:

– Sed mi ja ne pensas, kamarado Ĉumovoj. Mi estas homo senutila.

– Se tiel, kurtigu viajn brakojn, ne faru tion, kion vi ne komprenas, – kamarado Ĉumovoj riproĉis Makaron.

– Se mi, kamarado Ĉumovoj, havus vian kapon, ankaŭ mi povus pensi, – konfesis Makaro.

– Tute ĝuste! – konfirmis Ĉumovoj. – Sed estas nur unu tia kapo en la tuta vilaĝo, kaj vi devas obei min.

Ĉumovoj tuj monpunis Makaron pro ĉio, kaj do Makaro estis devigita iri al Moskvo labori por pagi la monpunon, lasinte la karuselon kaj la hejman mastrumadon al la diligenta zorgado de kamarado Ĉumovoj.

Makaro veturis trajne antaŭ naŭ jaroj, en la dek-naŭa jaro. Tiam oni veturigis lin senpage, ĉar Makaro okulfrape similis al kamplaboristo, kaj oni eĉ ne petis lin

montri la legitimilon. “Plu veturu, – kutime parolis al li la proleta gardistaro, – ni vin ŝatas, ĉar vi malsatas”.

Nun Makaro, same kiel antaŭ naŭ jaroj, enrajniĝis sen permeso, mirigita pro la malmultaj pasaĝeroj kaj malfermitaj pordoj. Tamen li sidiĝis ne meze de l' vagono, sed ĉe la kuplilo por vidi, kiel la radoj funkcias dum la veturado. La radoj ekfunkciis, kaj la trajno ekiris al la centro de l' ŝtato – al Moskvo.

La trajno veturis pli rapide ol ajna rajdĉevalo. Stepoj kuris renkonte al la trajno kaj neniam finiĝis.

“Ili fintorturos la maŝinon, – Makaro domaĝis la radojn. – Vere, multo estas en la mondo, ĉar ĝi estas vasta kaj malplena”.

La brakoj de Makaro ripozis, ilia libera saĝa forto ekiris al lia ampleksa, malplena kapo, kaj li komencis pensi. Makaro sidis ĉe la kuplilo kaj pensis, kiel li kapablis. Sed Makaro sidis ne longe. Venis nearmita gardisto kaj petis montri la bileton. Makaro ne havis bileton, ĉar, laŭ lia supozo, nun la firma soveta potenco tute senpage veturigas ĉiujn, kiuj bezonas veturi. La gardisto-kontrolisto diris al Makaro, ke tiu por eviti malbonon, eltrajniĝu en la plej proksima stacio, kie estas kantino, por ke Makaro ne mortu pro malsato dum vojaĝo ie inter du mallumaj stacioj. Makaro konstatis, ke la ŝtata potenco lin ne forpelas, sed proponas kantinton, kaj li dankis la estron de la trajnoj.

Tamen en la stacio Makaro ne eliris, kvankam la trajno haltis por elportado de kovertoj kaj poŝtkartoj el la poŝta vagono. Makaro rememoris certan teĥnikan konsideron kaj restis en la trajno por helpi ĝin plu veturi.

“Ju pli pezas la objekto, – Makaro image komparis ŝtonon kaj lanugon, – des pli malproksimen ĝi flugas, kiam oni ĵetas ĝin; ankaŭ mi en la trajno veturas kiel ekstra briko, por ke la trajno povu rapide veni al Moskvo”.

Ne dezirante ofendi la trajnogardiston, Makaro grimpis en la profundon de la subvagona meĥanismo kaj ekkuŝis tie por ripozi, aŭskultante la impresan rapidon de la radoj. Pro la ripozo kaj vido de la subtraka sablo, Makaro profunde ekdormis kaj sonĝis, kvazaŭ li forŝiriĝus de la tero kaj flugus en frosta vento. Pro tiu luksa sento li kompatis la homojn, kiuj restis sur la tero.

– Serĉjo, kial vi preterlasas la varmegajn ekstremaĵojn de la radokoloj?

Pro ĉi vortoj Makaro vekiĝis kaj tuŝis sian kolon: ĉu enordas lia korpo kaj lia interna vivo?

– Ne gravas! – Serĉjo kriis de fore. – Moskvo proksimas: ili ne forbrulos!

Ĝi estas demonstra versio de la 137-paĝa marta *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn.

Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:

<https://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>

Ema

de Paulo Sérgio Viana



Ema kaj mi interkonatiĝis kiam ni estis ankoraŭ sufiĉe junaj koleginoj, apenaŭ iom pli ol dudek-jaraj. Ni frekventis bazan kurson pri flegarto en teknika nivelo. Baldaŭ formiĝis milda kamaradeco, motivita de similaj temperamentoj. Ni ambaŭ estis disk-retaj, rezerviĝemaj, eĉ iom timemaj. Ŝi estis jam katolika monaĥino, kaj loĝis kun aliaj monaĥinoj, ĉiuj ja multe pli aĝaj ol ŝi, en granda domo situanta ne tre for de la urba hospitalo. Post la kurso, ni ambaŭ estis dungitaj kiel helpantoj en flegado de virinoj en la hospitalo. Ni senĉese aktivadis dum nia deĵorado, sed dum kelkaj paŭzaj minutoj ni sidis en la kafejo de la hospitalo kaj babilis pri plej diversaj aferoj. Tiel mi iom post iom ricevis la vivobildon de tiu soleca virino, kiu bezonis longajn jarojn por fine kompreni la sencon de sia propra vivo. Se entute oni povas diri, ke la vivo de ni ĉiuj, homoj, malkovras al ni sian plenan sencon.

Ema estis eta virino. Alta je unu metro kaj duono, kvardek kilogramojn peza. Ŝia korpo estis sengrasa, anguleca, ŝiaj okuloj estis ĉiam duone fermitaj, kvazaŭ ŝi estus ĉiam iom laca kaj melankolia. Ŝia haŭto estis tre blanka kaj la haroj, blondaj kaj mallonge tonditaj. Ŝi estis tre aktiva. Ŝi paŝadis tien kaj reen, dum la laboro, kaj ĉiam trovis ion por fari, jen organizi medikamentojn, jen ordigi la litotukojn de la pacientinoj, jen plenumi la preskribojn de la doktoroj. Malofte oni aŭdis ŝian voĉon, kiu cetere sonis ĉiam mallaŭte, preskaŭ flustre.

Ŝi naskiĝis en la kamparo, en bieno, kiel unua infano; poste naskiĝis du gefratoj. Ŝia patro estis malriĉa laboristo en la bieno, kaj la familio loĝis en tre simpla, eta domo, kie apenaŭ povis amasiĝi la gepatroj kaj gefiloj. Ŝi frekventis elementan lernejon, situantan sufiĉe for de la bieno, kio postulis longan ĉiutagan piediradon, ire kaj revene. Tiel ŝi ricevis nur la bazan edukadon.

Ĝi estas demonstra versio de la 137-paĝa marta *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn.

Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:

<https://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>

Nur 88 libroj. Sen bitlibroj kaj EAB

Ekde sia renaskiĝo “La Ondo de Esperanto” ĉiujare publikigas statistikon de la libro-produktado en Esperantujo, daŭrigante la iniciaton de Vilmos Benczik en “Hungara Vivo”. Por tiuj malmultaj, kiuj unuafoje abonas “La Ondon”, mi ripetu kelkajn enkondukajn frazojn, kiujn prefere ne legu niaj konstantaj abonantoj.

La bazo de nia statistiko estas la rubriko “Laste aperis” (LA) de la revuo “Esperanto”, en kiu estas registrataj ĉiuj paperaj libroj, kiujn la libroservo de UEA ekvendis dum la aktuala jaro. Tia statistiko ja estas kritikebla kaj kritikinda.

Unue, en LA estas registrataj libroj, eldonitaj pli frue sed ekvenditaj de UEA en la koncerna jaro. Tio povas doni misan bildon pri la revuata jaro, sed la resuma statistiko glatigas la fluktuaĵojn kaj fidiinde vidigas la ĉefajn tendencojn en nia eldonado.

Due, la libroservo de UEA vendas ne ĉiujn novajn librojn, kaj en LA kutime mankas lerniloj eldonitaj por enlandaj bezonoj (ekzemple, lerniloj por ĉinoj) kaj etkvante eldonitaj broŝuroj, kiujn la aŭtoroj disvendas kaj disdonacas en siaj kluboj kaj renkontiĝoj. Same mankas en LA kongreslibroj, programbroŝuroj kaj jarlibroj, kiuj abunde aperas ne por vendado tra libroservoj, sed por disdono al la respektivaj kongresanoj kaj asocioj. Kaj kelkaj eldonejoj ne proponas siajn librojn al UEA.

Trie, ekster la statistiko restas la bitlibroj, kiujn oni ofertas sen zorgi pri paperaj eldonkostoj. Tio reduktas la paperan rikolton.

Sed mankas pli granda statistika bazo ol “Laste Aperis”. Vidu la rezulton.

	1991-2000	2001-2010	2011-2020	2021-2023	2024	91-2024 Sume aŭ averaĝe
Nombro de libroj en/pri Eo	2107	1913	1465	306	88	5.879
Suma paĝonombro	251.276	276.616	228.165	51.075	14.919	822.051
Averaĝa paĝonombro de libro	120,3	145,2	155,7	166,9	169,5	139,8
Averaĝa prezo de libro (eŭroj)	8,20	11,40	12,10	14,7	15,2	10,68
Lernolibroj, vortaroj k. s. pri Eo	296	307	172	20	2	797
Originala beletro	258	214	213	63	15	763
Traduka beletro	458	361	330	100	37	1286
Lingvistiko, esperantologio	229	211	174	24	6	644
Eo: historio, kulturo, movado...	241	299	173	30	11	754
Politiko, historio, socio	166	228	248	36	8	686
Scienco kaj tekniko	182	93	33	10	3	321
Religio	105	93	72	15	4	289
Aliaj temoj	172	107	50	6	2	337

Jaro	Libroj	Paĝoj
1991	222	26.091
1992	205	25.789
1993	136	18.511
1994	188	22.078
1995	200	23.345
1996	232	28.637
1997	273	27.727
1998	208	28.769
1999	208	24.460
2000	235	25.869
2001	222	31.520
2002	174	26.451
2003	224	28.424
2004	183	27.295
2005	159	23.780
2006	204	30.078
2007	184	31.183

Jaro	Libroj	Paĝoj
2008	158	25.381
2009	158	24.272
2010	204	28.232
2011	172	19.775
2012	153	23.144
2013	178	25.344
2014	107	14.024
2015	172	25.629
2016	189	32.323
2017	139	23.353
2018	127	19.483
2019	150	28.194
2020	78	16.906
2021	106	16.088
2022	100	15.871
2023	100	19.116
2024	88	14.919

En 2024 surmerkatiĝis 88 libroj, malpli multaj estis nur en la malgrasa 2020a jaro. La ĝenra distribuo (vidu la tabelon en la antaŭa paĝo) rekonfirmas, ke nun aperas malmultaj lerniloj, ja en la nuna epoko oni pli lernas Esperanton rete, sed ne per paperaj libroj. Kiel kutime la plej popularaj estas tradukitaj beletraĵoj.

EAB denove mankas

Mondial plu estas plej supre kun 13 libroj kaj tri numeroj de “Beletra Almanako” – entute 16 volumoj. Same 13 librojn, ĉefe reeldonojn, surmerkatis Fonto. La tria devintus esti Esperanto-Asocio de Britio kun 10 libroj, pri kiuj Tim Owen rakontas en ĉi tiu “Ondo” (p. 108-112), sed ilin LA ne registris. Jen ekzemplo de la mankhava bazo de nia statistiko. Nova en la listo estas BoD el Norderstedt, kiu dum 2021-24 “lastaperigis” naŭ librojn, precipe tradukojn de D. kaj H.-G. Kaiser.

2024. Libroj

Mondial (Usono)
Fonto (Brazilo)
BoD (Germanio)
KAVA-PECH (Ĉeĥio)

2024. Paĝoj

Mondial	2401
BoD	2179
Fonto	1478
KAVA-PECH	1126

Ĝi estas demonstra versio de la 137-paĝa marta *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn.

Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:

<https://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>



2024 en libroj por EAB


La eldonritmon de 2022 (15 libroj) kaj 2023 (14) ne kapablis konservi Esperanto-Asocio de Britio en 2024. La jaro tamen ne estis sensukcesa: ni ricevis du premiojn kaj eldonis dek librojn. Neniuj el tiuj troveblas en nia retejo, aŭ ĉe plejmultaj aliaj Esperantaj libroservoj: oni aĉetas ilin rekte de retbutikoj kiel Amazono. Tial ni ne devas okupiĝi pri plenumado, stokado, ktp, kaj la libroj troviĝas, kie esperantistoj tute nature serĉas ilin; tre malmultaj nespertaj uzas la tradiciajn servojn, se ili eĉ aŭdis pri ili.

Eblas dividi la eldon-agadon en tri kategoriojn, nome: 1) projekto por honori Marjorie Boulton kaj William Auld; 2) enfokusigo de la muminoj; 3) unuopaĵoj.

Festjaro BAULDTON

Naskiĝis en 1924 la du plej altgradaj kontribuintoj el Britujo al la Esperanta literaturo. Estis, do, nature celebri ilin, kaj tion EAB faris plurmaniere per sia projekto Festjaro Bauldton. Inter la celebraĵoj staris reeldonado de kelkaj iliaj verkoj.

La projekto komenciĝis per la unusola libro, kiun ili ambaŭ kunverkis. “Rimletoj” (eldonita en aprilo, 25 vendoj je Amazono kaj tiaj retbutikoj) estas aparte notinda pro tio, ke ĝi estis rezulto de okmonata korespondado inter la du junuloj – tiam ankoraŭ ne atingintaj tridek jarojn – kiam ili estis relative freŝbakitoj. Unu tagon en 1953 Auld invitis Boulton korespondi per rondeloj, mezfranca poemformo. La «duel-invito» ŝi akceptis. Temis pri interŝanĝo finfine de 84 poŝtkartoj, origine eldonitaj kolektite en 1976. Luksan version, plenkoloran kun aldonaj bildoj kaj postparolo, ricevis partoprenantoj de la Brita Kongreso en majo, kaj de ceremonioj okazigitaj por Marjorie kaj Bill en iliaj naskiĝtagoj.



Bedaŭrinde malmulto pli okazis rilate libroeldonadon por la Festjaro. Provoj havigi al EAB la rajtojn reeldoni la triopon “La mastro de l’ ringoj” haltis, ĉar agento konsentis pri la kondiĉoj kaj intencis plusendi al la administrantoj de la postlasaĵo Tolkien por konsidero kaj subskribado, sed trovis intertempe postenon ĉe alia firmao. La nomata anstataŭulo poste respondis al neniuj el pluraj mesaĝoj.

Mi planis du pliajn projektojn, kiujn mi prilaboris, sed ne finis ĝustatempe: reeldonadon en unu volumo de “Enkonduko en la originalan literaturon de Esperanto” kaj “Vereco. Distro. Stilo. Romanoj en Esperanto” de Auld, kaj de koktelo de du mallongaj noveloj

pri katoj kaj rilataj poemoj verkita de Marjorie, “La kata kolekto”. Preskaŭ finite jarfine, ili salutas la mondon iam, sed pro la paso de la Festjaro, aliaj projektoj nun havas prioritaton.

Eblis fini 2024 per du Bauldtonaĵoj: reeldono de “La Ĉashundo de la Baskerviloj” (decembro, 3 vendoj), en traduko de Auld, kun nova materialo de Simon Davies, kaj tria eldono de “Traduku!” (decembro, 0), kolekto de traduk-ekzercoj starigitaj de Auld por legantoj de “La Brita Esperantisto”.

Fino de la mumin-serio

En 2022 ni lanĉis “Kometon en Muminvalo”, la unuan libron en la serio pri muminoj verkita de Tove Jansson. Sekvis en 2023 du pliaj, je distanco naŭ monatojn for unu de la alia. Nia plano estis eldoni po unu el la restantaj kvar en ĉiu sinsekva jaro, sed Fondumo Esperanto en Finnlando tre malavare finance kontribuis por plirapidigi la aperritmon, kio rezultigis la eldonon de ĉiuj kvar en 2024, kun rezulto, ke la tuta serio estas aĉetebla en Esperanto koincide kun la 80a datreveno de la Muminoj:



Ĝi estas demonstra versio de la 137-paĝa marta *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn.

Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:

<https://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>

Oskaro 2025

Ĉiujare mi aŭdas akrajn komentojn pri la disdono de premioj de la Usona Film-akademio. Foje temas laŭdire pri mankanta kvalito ĝenerale, foje pri laŭdira mem-celebrado de blankaj olduloj, foje pri mankanta diverseco – sed finfine Oskaro daŭre estas la plej prestiĝa premio, kiun filmo povas akiri. Punkto.


Speciale interesas min, kiuj filmoj aperas kiel kandidato por **la plej bona internacia filmo**. Tial ni unue trarigardu, kiel kutime, la “mallongan liston” de internaciaj (= neanglalingvaj) filmoj:

KAMPANJOJ

Eĉ sen esti spertulo, ĉiuj povas akcepti la frazon, ke Oskaroj temas precipe pri mono. La filmstudioj investas grandegajn sumojn por varbi por siaj produktoj.

Ĉi-jare estas evidente, ke la propaganda kampanjo de Netflix por *Emilia Pérez* de Jacques Audiard estis treege efika. Tiu distra, sed cetere ne pli ol averaĝa filmo laŭ ĉiuj kriterioj, kolektis entute 13 nomumojn. Iam Audiard estis grava reĝisoro kun elstaraj filmoj kiel *Dheepan* (2016), *De rusto kaj ostoj* (2012) aŭ *Profeto* (2009). *Emilia Pérez* ŝajne funkcias bone sur papero, sed la plenumo estas maksimume mediokra. Pri kio temas? Manitas del Monte estas la estro de drokartelo en Meksiko. Lia sekreta revo estas fariĝi virino. Advokatinino Rita trovas klinikon, kie li transformiĝas. Kiel virino sub la nomo Emilia Pérez, ŝi revenas al Meksiko. Emilia Pérez helpas inter alie tiujn familiojn, kiuj antaŭe estis viktimoj de Manito. Jen la telenovelsimila intrigo. La alia komponento estas muzikalo. (Eble *Annette* de Leo Carax [2021] donis al Audiard la inspiron por tiu eksperimento?) Sed li sukcesas prezenti muzikalon sen atentokaptaj melodioj. La geaktoroj klopodis laŭeble plenumi siajn kanzonojn, kaj tio ne estas pura delico.

Eble Audiard intencis krei komprenon por transgenruloj. Tamen la ĉefaktorino Karla Sofía Gascón ne estis tre taŭga persono por alvoki al toleremo, ĉar ŝi pli frue publikigis rasistajn kaj aliajn malamajn mesaĝojn. Krome ŝi ridindigis la klopodojn de la Akademio atingi pli da diverseco. (Jen la nova plej malŝatata vorto de la nova usona registaro. Estos interese observi, kien evoluos la Akademio kaj diverseco dum la regado de la nova usona prezidento.) Post kvinstela kampanjo kontraŭ tristela filmo *Emilia Pérez* rikoltis nur du relative malgravajn premiojn dum la festa evento.



Iĝu abonanto de “La Ondo de Esperanto”!

BARATO PLI OL BOLLYWOOD!

Francio proponis *Emilia Pérez* por la plej bona internacia filmo. Tiel ili neglektis alian fortan konkursaĵon, nome *Ĉio, kion ni imagas kiel lumon* (All We Imagine as Light) de Payal Kapadia

En tiu filmo ni sekvas la sorton de tri virinoj en Barato. Kiamaniere vivas flegistino, kies edzo laboras eksterlande? Kiaj problemoj ekestas, se hinduistino amas muzulmanon? Kaj ĉu sola virino povas defendi sian hejmon kontraŭ krimaj spekulantoj? Gravaj demandoj, kiuj estas serioze pritraktitaj sen la kutime kiĉaj aldonoj de Bollywood.

La barata elektokomitato ankaŭ povintus proponi tiun filmon, sed ili opiniis, ke ĝi estis pli eŭropa produkto, kiu estis filmita en Barato. Ili elektis anstataŭe *La perditaj edzinoj* (Laapataa Ladies) de Kiran Rao. La premiso de tiu filmo estas iomete stranga por spektantoj kiel mi. Ĝi asertas, ke novedziniĝitaj virinoj ofte perdiĝas survoje al la vilaĝo de siaj edzoj. La filmo estas ĉarma kaj distra, vidinda komedio de moroj. Cetere estas grava mesaĝo: ne malŝparu la talentojn kaj iniciatojn de virinoj. Se vi havas la eblecon, nepre spektu *La perditaj edzinoj*, kvankam ĝi ne aperis en la mallonga listo de nomumebraj konkursaĵoj.

Santosh de Sandhya Suri ja aperis tie, sed ne estis nomumita. Anglio parte produktis tiun hindlingvan filmon kaj proponis ĝin kiel kandidaton. Ankaŭ la premiso de tiu filmo estas iom stranga por eŭropa spektanto: la edzo de Santosh estis policano, kaj li mortis dum servo. Pro iu registara programo Santosh kvazaŭ heredas la postenon de sia edzo. Ŝi konatiĝas kun aspektoj de la patriarka socio kaj devas decidi, ĉu ŝi volas aŭ povas adaptiĝi en la kadro de tiuj kondiĉoj. Jes, filmoj povas pligrandigi nian scion pri vivo en aliaj mondopartoj.

Tiuj tri filmoj montras, ke Barato povas oferti multe pli ol la operetojn de Bollywood. Cetere: tiuj tri filmoj estis reĝisoritaj de virinoj.



PERSLINGVA FILMO EL GERMANIO

La semo de la sankta figarbo de Mohammad Rasulof el Irano estas internacia kunproduktaĵo. La teokrata reĝimo klopodis malebligi internaciajn prezentojn de tiu filmo. Sekve la reĝisoro devis fuĝi el sia hejmlando. La filmo temas pri la esplorjuĝisto Imam, kiu estas devigata subskribi verdiktojn, inkluzive de mortpunoj, sen esploro de la kazoj. Rasulof muntas filmregistrojn de kontraŭreĝimaj eventoj de 2022 en la filmon, kio plialtigas la efikon. Iam Imam ne plu estas anonima, ĉar liaj kontaktdatoj aperas en la reto. Tio povas fariĝi danĝera situacio por la familio. La tri partoj de la filmo estis reĝisoritaj en diversaj stiloj, tiel la filmo ne evoluigas sian tutan potencialon. Tamen ĝi estas grava kaj videnda. La titolo referencas al Religia fikuso, kiu disvastiĝas ĉirkaŭante kaj fine strangolante aliajn arbojn. Tio estas simbolo por la reĝimo. Germana kompanio parte financis tiun filmon, kaj pro

tio Germanio proponis ĝin kiel plej bonan internacian filmon. Tiel ili preteratentis bonajn hejmajn kontribuojn, kiel ekzemple *Morti* (Sterben) de Matthias Glasner.

JUNECO – NUN KAJ MEMORE

De Irlando venis filmo pri hiphopa grupo *Kneecap* (reĝisoro: Rich Pepppiat). La iniciata protesto estis, ke ili ne rajtis uzi sian propran gaelan lingvon, sed poste la protesto etendiĝis. Filmo, kiu estas plena de kruda energio.

En la lastaj jaroj venis relative multe da spektindaj filmoj el Norvegio. *Armand* de Halfdan Ullmann Tøndel estas por mi tamen iom surpriza elekto. Ĝi komenciĝas forte. La situacio similas al *Masakro* (Carnage) de Roman Polanski. La gepatroj de du lernantoj devas diskuti mispaŝon de unu infano, sed anstataŭ fari tion, ili kverelas. Iam reĝisoro kaj scenaristo ŝajne ne plu havis ideojn kaj ili finas eksperimente kun ia esprimdancado. Ve, iom plia cerbumado certe estus altiganta la kvaliton.

El Islando venis *Tuŝo* (Snerting) de Baltasar Kormákur. Tio estas filmo pri memori kaj retrovi. Kristófer estas vidvo kaj jam montriĝas la unuaj indikoj de Alzheimer. Li decidis, ke li volas retrovi sian iaman amikinson Miko. En la 70aj jaroj ili amikiĝis en Londono, sed subite ŝi estis for. Je la fino de sia vivo li klopodas retrovi sian perditan amikinson – jes, iom melankolie, sed ankaŭ *tuŝe*.

Nun pri filmo, kiun mi ne sukcesis vidi: *Universala lingvo* (Une langue universelle) de Matthew Rankin. La filmdistribuantoj pludonis tiun filmon de unu festivalo al la alia, elsendfluaj kompanioj havis ĝin dum limigita tempo por specifaj regionoj de la mondo. Evidente mi loĝas en tro malgrava loko, ĉar neniuj volas aperigi ĝin tie, kie mi estas. Tutmondiĝo? Mi kreas pro rido!

LA LONGAJ OMBROJ DE LA HISTORIO

La Akademio elektis *Mi daŭre estas ĉi tie* (Ainda estou aqui) de Walter Salles el Brazilo kiel la plej bonan internacian konkursaĵon. La filmo ja imponas. En 1971 estis militista diktaturo en Brazilo. La reĝimo arestas Rubens Paiva, kiu estas eksparlamentano kaj kritikanto de la militistoj. Li malaperas kaj post kelkaj jaroj evidentiĝas, ke li estis murdita. La vidvino persiste klopodas esplori, kio okazis. *Mi daŭre estas ĉi tie* estas portreto de forta virino luktanta kontraŭ kovarda reĝimo. La grandioza Fernanda Torres estis prave nomumita por plej elstara aktorino.

Ĝi estas demonstra versio de la 137-paĝa marta *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn.

Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:

<https://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>

La sepa arto

Instruisto klarigas al studentoj de reĝisora kurso diferencon inter la ĝenroj:

- Fantazio estas historio, en kiu oni preskaŭ mortigis la rolulon, sed lastminute venas liaj amikoj kaj savas lin. Dramo montras ke amikoj venas por savi la heroon, sed malfruas por nura minuto, do li jam estas murdita.

Voĉo el la salono:

- Pardonu, sed kio estas realismo?
- Realismo estas ke oni murdis la rolulon, sed liaj amikoj eĉ ne planis savi lin.

Renkontiĝis du emeritoj:

- Kio pri via sano, kara?
- Mia sano estas kiel televidserioj – ĉiu sekva sezono estas pli malbona ol la antaŭa...

Du fakuloj interparolas post la spektado de nova versio de “Cindrulino”:

- Ne, ĉi tiun historion devus filmi Quentin Tarantino...
- Kial?
- Nur li povus ĝuste filmi la historion de junulo kiu malsukcesis rememori la vizaĝon de junulino, kun kiu li pasigis nokton, kaj pro tio palpis la piedojn de centoj da aliaj junulinoj!

Ĵurnalisto demandas kinostelulinon:

- Kiom da edzoj vi havis?
- Ĉu vi interesiĝas pri miaj edzoj aŭ pri la ĝenerala nombro?

Du gejunuloj foriras el kinejo. La junulino diras:

- La filmo estas pli interesa.
- Pli interesa ol la libro?
- Ol vi!

Du uloj priparolas ekzotajn kinospertojn.

- Imagu, hieraŭ mi unuafoje spektis hororfilmon, faritan en Barato!
- Ĉu la aktoroj ne kantas kaj dancas, kiel kutime?
- Jes, sed ili kantas kaj dancas terure!

Afiŝo: “Estas serĉataj aktoroj por Brazila televidserio. La unuaj kvin jaroj estos testoperiodo”.

Plukis kaj tradukis **Stanislav Belov**

Spritaj splitoj kaj preskeraroj

El la kolekto de reduktoro

Generale parolante

Inter la ĉefaj kialoj de la pliigo de puĉoj en Sahelo generale eblas mencii fortajn geopolitikajn diferencojn inter la afrikaj landoj... (Julius Hauser: Kio okazas en Sahelo? // Monato, 2025, №3, p. 5; rimarkis Laurent Ramette).

Wandel ŝanĝis sekson?

Amri Wandel, profesoro pri astrofiziko en la Universitato de Jerusalemo kadre de la ŝianta programo de la 59aj Baltiaj Esperanto-Tagoj ... prelegos pri astrofiziko. (17 okt 2024, <https://facebook.com/groups/esperanto.grupo/posts/10161668887790289>; atentigis Valentin Melnikov).

Esperato-kongreso en Bro

La salonon Zamehof gastigos... moderna koncertejo. (Dua Bulteno de la 110a UK en Brno, p. 9).

Virinaj ondumoj?

Ŝi tamen decidis ne tro involviĝi kaj resti neŭtrala, kion mi tute respektas. (Michael Vrazitulis, 14 feb 2025, <https://groups.google.com/g/tejo-komitato/c/hnzO-6QYhyA0>).

Kiu minacas, tiu avertas (Zamenhof)

Ĉiuj povas agordi siajn abonpreferojn ĉe <https://uea.org/via/retlistoj> – kie eblas aboni avertojn pri ĉiu nova numero de Esperanto. (Senpage elŝuteblas la januara numero de la revuo Esperanto // Gazetara komuniko de UEA, 2024, №1149; rimarkis Kalle Kniivilä).

Vagonaro da intelekto

... en la estonteco oni povos trajni specialajn modelojn per helplingvaj korpuso. (Gilles-Philippe Morin: Antaŭparolo // Posta Mundi, 2025, №46, p. 3).

La blablao de la jaro, aŭ:

Kulture kompetenta, kristalklara kongresa profito

La Itala Kongreso... tion ni povis profiti (...) por pli vaste diskonigi konscion pri la utilo de pensado pri IKK por la progresigo de la serioza pritakso de la kontribuoj de la komunumo de parolantoj de Esperanto fare de eksteraj aktivuloj por internacia kunlaborado. [Noto: IKK: Interkultura Kompetento]. (Konversacio kun Duncan Charters // Esperanto, 2025, №1, p. 11).

Plukis **István Ertl**

Perantoj de *La Ondo de Esperanto*

Belgio: Flandra Esperanto-Ligo, Lange Beeldekenstraat 169, BE-2060 Antwerpen. Rete: retbutiko@fel.esperanto.be.

Brazilo: Brazila Esperanto-Ligo, SDS Ed. Venâncio III Sala 301, BR-70393-902 Brasília-DF, CEP 70.393-902. Rete: bel-abonservo@esperanto.org.br.

Bulgario: Georgi Mihalkov, «Nadejda» V, bl. 529, vh A et 9 ap 33, BG-1229 Sofia. Rete: modest@abv.bg.

Ĉeĥio: Pavel Polnický, Lidická 939/11, CZ-29001 Poděbrady III. Rete: polnickypavel@seznam.cz.

Ĉinio: Zhang Yan, Linyi shi, lanshan qu, taihe huayuan, CN-276000, Shandong sheng. Rete: 122309267@qq.com.

Finnlando: EAF / Paula Niinikorpi. Rete: paula.niinikorpi@gmail.com.

Francio: Espéranto-France, 4 bis rue de la Cerisaie, FR-75004 Paris. Rete: info@esperanto-france.org.

Germanio: Wolfgang Schwanzer, Pfarrer-Seeger-Strasse 9, DE-55129 Mainz. Rete: abono@esperanto-buecher.de.

Hungario: Hungaria Esperanto-Asocio, HU-1146 Budapest, Thököly út 58-60. Rete: hungario@gmail.com.

Hungario: Eszperantó Alapítvány, Leiningen u. 4, HU-1193 Budapest. Rete: szilvasi@eszperanto.hu.

Italio: Itala Esperanto-Federacio, Via Villoresi 38, IT-20143 Milano. Rete: feisegreteria@esperanto.it.

Japanio: Japana Esperanto-Instituto, Sinzyuku-ku Waseda-mati 12-3, Tōkyō-to 162-0042. Rete: esperanto@jei.or.jp.

Katalunio: Sandra Vives Gomez, c/ Bonestar 64 3-3, 08940 Cornellà de Llobregat, (Barcelono). Rete: sandra@esperanto.cat.

Litovio: Litova Esperanto-Asocio, p. k 167, LT-3000 Kaunas-C. Rete: litova.ea@mail.lt.

Nov-Zelando: David Ryan, PO Box 3867, Wellington, NZ-6140. Rete: ryangomez@xtra.co.nz.

Ruslando: Галина Романовна Горецкая, 236039, Калининград, Старопрегольская наб., 10-13. Rete: laondodeesperanto@gmail.com.

Slovakio: Stano Marček, Zvolenská 15, SK-03601 Martin. Rete: stano.marcek@gmail.com.

Svedio: Leif Holmlund, Kågevägen 40 B, SE-931 38 Skellefteå. Rete: leif.holmlund@telia.com.

Usono: Esperanto-USA, 91-J Auburn St #1248, Portland ME 04103. Rete: eusa@esperanto-usa.org.

Oni povas pagi la abonon al nia UEA-konto “avko-u”.

Oni denove povas aboni la “Ondon” per la internacia pagosistemo PayPal ĉe <https://paypal.me/GGORETSKIY>.

Ĝi estas demonstra versio de la 137-paĝa marta *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn.

Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:

<https://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>